

Veranstaltungshinweise

Unsere Esp.-Lernrunden für: a) Anfänger m. Vorkenntnissen (Stufe A2¹⁾): Mi. 18:00-19:30 Uhr, Gemeindehaus d. kath. Kirchengemeinde St. Willehad, St.-Willehad-Str. 37, 26954 Nordenham; b) Fortgeschrittene (Stufen B1, B2, C1¹⁾): Do. 19:15-20:45 Uhr, Ev.-luth. Kirchengemeinde Brake, Kirchenstr. 24, 26919 Brake, oder – oft im Winter – als Skype-Konferenz.

¹⁾Stufen: s. http://de.wikipedia.org/wiki/Gemeinsamer_Europ%C3%A4ischer_Referenzrahmen

17.10.2013 19:30 Uhr	Gaststätte <i>Zur Kogge</i> , Rathausplatz 7, 26931 Elsfleth	Vereinstreffen; Alke trägt über ihre Island-Reise vor
28.11.2013 19:30 Uhr	Gaststätte <i>Weserterrassen</i> Strandallee 10, 26954 Nordenham	Vereinstreffen mit Weihnachtsfeier
16.01.2014 19:30 Uhr	Gastst. <i>Müggenkrug</i> , Elsflether Str. 52, 26125 Oldenburg	Vereinstreffen

Gäste sind willkommen. Aktuelles u. Einzelheiten können unserer Netzseite <http://www.esperanto.de/unterweser/aranghoj.htm> entnommen oder bei Alke Geveke, Tel.: 0160-3760850, erfragt werden; allerneueste Infos: <https://twitter.com/egu1995>. Außerdem:

06.-11.10.2013	3. Esperanto-Herbstwandertage	Zell/Mosel
25.10.-03.11.2013	AÜTUNE–Gemeins. Ferienmachen für Kinder, Familien, Großeltern	Grésillon, Frankreich
30.11.2013	Malferma Tago de la Centra Oficejo	Rotterdam, Niederlande
14.-21.04.2014	30. Int. Frühlingswoche (PSI)	Xanten
28.05.-01.06.2014	geplant Printempa BARo	Bad Münders
06.-09.06.2014	91. Deutscher Esp.-Kongress	Erfurt
26.07.-02.08.2014	99. Esperanto-Weltkongress	Buenos Aires, Argentinien

***Ĝojan kristnasko-feston kaj bonan gliton en la novan jaron!
Ein frohes Weihnachtsfest und einen guten Rutsch ins neue Jahr!***

Impressum:

Zeitschrift: Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)
Erscheinungsweise: dreimal jährlich als Druck- u. elektronische Ausgabe,
 Netzseite: <http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>
Herausgeber: Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.
 (<http://www.esperanto.de/unterweser>)
Information und Redaktion: Anne Höpken, Schulstr. 13a, 26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837
 Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368
 Dr. Andreas Kück, Tel.: 04702-5044
 Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Bankverbindung

(für Beiträge und Spenden): Raiffeisenbank Oldenburg eG
 IBAN: DE26280602281200160000
 Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

Esperanto Gazeto

N-ro 38

ISSN 1861-3330

Okt. 2013 – Jan. 2014

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



Bremen, 11.08.2013: Mitglieder der Esperanto-Gruppen Bremen und Unterweser im Bürgerpark.

Bremeno, 11a de Aŭgusto 2013: Membroj de la Esperanto-Grupoj Bremeno kaj Unterweser en Bürgerpark.

Niaj klubrenkontiĝoj en la malfrua printempo kaj somero de 2013:

Tradukado kaj gastoj el Ameriko

(Oldenburg, 30a de Majo kaj 12a de Septembro, kaj Bremen-Vegesack, 22a de Aŭgusto 2013)

En Majo ni kunkontribuis al la traduko en Esperanton de por-infana rakonto. – En Aŭgusto ni akceptis gaston el Toronto (Kanado). Ryan rakontis pri sia



hejmurbo kaj la tiea Esperanto-grupo. – En Septembro vizitis nin Teĉjo el Porto Alegre (Brazilo) kadre de sia rondvojaĝo tra Eŭropo. Li konatigis nin kun *Tropikalia*, brazila artstilo de la 20a jarcento. – Andreas

Ryan (vierter von links) / Ryan (kvara de maldekstre)

Unsere Vereinstreffen im Spätfrühling und Sommer 2013:

Übersetzen und Gäste aus Amerika

(Oldenburg, 30.05. und 12.09., und Bremen-Vegesack, 22.08.2013)

Im Mai trugen wir mit bei zu der Übersetzung einer Kindergeschichte ins



Esperanto. – Im August empfingen wir einen Gast aus Toronto (Kanada). Ryan erzählte uns von seiner Heimatstadt und der dortigen Esperanto-Gruppe. – Im September besuchte uns Teĉjo aus Porto Alegre (Brasilien) im Rahmen seiner Rundreise durch Europa. Er brachte uns *Tropicalia* näher, einen brasilianischen Kunststil des 20. Jahrhunderts. – Andreas

Teĉjo (stehend) / Teĉjo (staranta)

Enigma

	1	2	3	4	5	6
1						
2						
3		7		8		
4					9	10
5						
6						

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj devenanta el likviĝo de vaporo; 6: ĉeloj rezultigas la nomon de ŝtato en la malviro; 7: konstruaĵo, kies alteco estas granda rilate al la du aliaj dimensioj [sen finaĵo]; 8: objekto, kiun oni elektas, kaj laŭ kies (hazarda) indiko oni decidas [sen finaĵo]; 9: la 13a litero [kun finaĵo de substantivo]; 10: germane: numero [mallongigo].

Horizontale

1: kiel eble plej plenigi per io konkreta; 2: plato, kiu servas por alporti tasojn, glasojn k. s. [kun finaĵo de akuzativo]; 3: kolekto de mapoj; 4: memlumanta astro; 5: vertikala konstruaĵo el brikoj [kun finaĵoj de pluralo k akuzativo]; 6: elokventa publika parolanto [sen finaĵo].

Vertikale

1: ne-vola rigidigo de muskolo; 2: granda en vertikala direkto [sen finaĵo]; 3: plata vazo, el kiu oni manĝas [kun finaĵo de adjektivo]; 4: virina nomo; 5: demetaĵo de etaj gutoj de akvo

Am Emmasee in Bremen / Ĉe Emmasee en Bremen

Mittag

Am Waldessaume träumt die Föhre,
Am Himmel weiße Wölkchen nur;
Es ist so still, dass ich sie höre,
Die tiefe Stille der Natur.

Rings Sonnenschein auf Wies und Wegen,
Die Wipfel stumm, kein Lüftchen wach,
Und doch, es klingt, als ström' ein Regen,
Leis tönend auf das Blätterdach.

Theodor Fontane (1819-1898)

Tagmez'

Che la arbarrando songhas la pin',
Chiele blankaj nubetoj nur;
Kvietas tiel, ke mi audas ghin,
La grandan trankvilon de l' natur'.

Sunbril' sur herbej' kaj voj' chirkaue,
Sen zefiro, la suproj en silent',
Kaj ja, tiel sonoras kvazaue
Fluas pluv' milde al folitegment'.

(el la germana esperantigis Andreas)



Junia ekskurso 2013 de la Esperanto-Grupoj Subvisurgo kaj Bremeno (Bremen-Rekum kaj Bremen-Farge, 30a de Junio 2013)

La unua celo de nia ĉi-jara Junia ekskurso estis *Denkort Bunker Valentin*



U-Boot-Bunker Valentin / Submarŝipa bunkro Valentin

(“pensigejo bunkro Valentin”) en Bremen-Rekum rekte ĉe Vezero. Dum la gvidado ni estis tre detale informitaj pri tiu ruino de submarŝipfarejo el la dua mondmilito. En la federacia lando Bremeno tio estas la ejo kun la plej alta nombro da viktimoj (ĉ. 1100) sekve de la nazia regado (ĉefe devigaj laboristoj pro subnutrado kaj mal-

Juni-Ausflug der Esperanto-Gruppen Unterweser und Bremen (Bremen-Rekum und Bremen-Farge, 30.06.2013)

Das erste Ziel unseres diesjährigen Juni-Ausflugs war der *Denkort Bunker Valentin* in Bremen-Rekum direkt an der Weser. Während der Führung wurden wir sehr detailliert über diese Ruine einer U-Boot-Werft aus dem Zweiten Weltkrieg informiert. Im Bundesland Bremen ist das die Stätte mit der höchsten Zahl an Opfern (ca. 1100) infolge der Nazi-Herrschaft (hauptsächlich Zwangsarbeiter durch Unterernährung und Krankheiten). Aus Sicherheitsgründen war ein Teil des Bunkers abgesperrt. Aber einen Einblick bekamen wir beim Rundgang draußen. Dadurch konnten wir uns die seinerzeit geplante Ausfahrt westerwärts der U-Boote vorstellen, deren Bau bevorstand. Der Bunker ist ein sowohl beeindruckendes als auch betrübliches Denkmal. Nach der Besichtigung trafen sich die neunzehn Ausflügler in Bremen-Farge zum Kaffeetrinken. – Anne, Dörte, Andreas

10a Rata Rendevuo de la Esperanto-Grupo Hameln (Bad Pyrmont, 8a de Septembro 2013)

La rendevuo de ĉirkaŭ 30 Esperanto-amikoj komenciĝis en la *Wandelhalle* (promena halo) per gustumado je akvo el diversaj fontoj. En la sekva vizitado de la cent jarojn aĝa palmĝardeno ni eksciis ne nur multon pri plantoj, sed ankaŭ, ke en la 1930aj jaroj tiu ĝardeno estis la kuliso de filma sceno ludanta en Italujo. Kadre de la tra-urba gvidado ni atingis ankaŭ la “Dunsthöhle” (haldadz-kavernon), naturan fonton de karbondioksido. Post la deklamado de kelkaj brazilaj poemoj fare de Teĉjo el Porto Alegre kaj kuna kantado ni spektis fine de la renkontiĝo en la palmdomo la koncerton “Wohin Wenn Nicht Jazzt” (“Kien Se Ne Jazas”) de Quadre Jesperanto. – Andreas



Im Palmengarten / En la palmĝardeno

10. „Rata Rendevuo” der Esperanto-Gruppe Hameln (Bad Pyrmont, 08.09.2013)

Das Rendezvous von etwa 30 Esperanto-Freunden begann in der *Wandelhalle* mit dem Kosten von Wasser aus verschiedenen Quellen. In der folgenden Besichtigung des hundert Jahre alten Palmengartens erfuhren wir nicht nur etliches über Pflanzen, sondern auch, dass dieser Garten in den 1930er Jahren die Kulisse einer Filmszene war, die in Italien spielte. Im Rahmen der Stadtführung erreichten wir auch die „Dunsthöhle”, eine natürliche Kohlendioxidquelle. Nach dem Vortragen einiger brasilianischer Gedichte durch Teĉjo aus Porto Alegre und gemeinsamen Singen schauten wir uns zum Abschluss des Treffens das Konzert von



Bei der Stadtführung / Dum la tra-urba gvidado

„Wohin Wenn Nicht Jazzt” von Quadre Jesperanto im Palmenhaus an. – Andreas

Glacilando (Islando, Julio 2013)

Libervole ferii en Islando, lando el fajro kaj glacio, pli longe ol la UK-semajno en la ĉi-jara kongresurbo Rejkjaviko? Jes, nepre. Dum 10 tagoj mi memorganizite antaŭkongresis en la alinomita "ultima Thule". Mi dekstrume ĉirkaŭis la nordian, preskaŭ 103.000 km² arean, insulon per luita aŭto. Ĉefe sur la 1350 kilometrojn longa ringstrato, sed ankaŭ deflankiĝinte, mi konatiĝis kun la multdiverseco de la tieaj pejzaĝoj.

La de mi atendita sovaĝa naturo abunde montris sin per fortaj akvofaloj, ŝprucantaj gejsiroj, malglatakraj lafokampoj, nigraj sablaĵoj, blankaj glaĉeroj, magiaj muskoj, sovaĝaj fjordoj kaj fumo el la tero kiel el bolanta kaldrono. Ĉio estis eĉ pli grandioza kaj rave bela ol mi antaŭe imagis.

Post la sperto de vizito al fremda, sed fascina mondo, mi revenis post veturado de entute 2200 kilometrojn al Rejkjaviko, la plej norda ĉefurbo de la tero. Tie, la partopreno en la 98a Universala Kongreso regvidis min el tute alia mondo al konata UK-kampo.

La ĉi-jara mondkongreso kun pli ol mil partoprenintoj el pli ol 50 landoj okazis en la nova koncertejo kaj konferencejo "Harpa" apud la malnova haveno. Vitraj kaj ŝtalaj eroj de tiu moderna arkitektura majstroverko aludas al la sesangulaj bazaltkolonoj, troviĝante en Islando. La diversgrandaj salonoj bone taŭgis por la multaj prelegoj, fakkunsidoj, diskutrondoj kaj kursoj. Kompreneble ankaŭ tradiciaj eroj kiel movada foiro, kleriga lundo, kongresuniversitato, ekzamenoj, koncertoj kaj teatraĵoj ne mankis.



Harpa

Dum la nacia vespero ni konatiĝis kun la kultura historio de la insulo. Estis montrite ekzemple Glima, la islanda lukto. En tiu batalsporto,

kiu estas heredaĵo de la vikingoj, du viroj komence ŝajnas brakumi kaj danci. Sed subite unu el ili estis prenita je sia speciala, paraŝutistsimila zono kaj ĵetita surplanken. Ĉiam resti rekte starante aŭ tuj restari estas tre grave. Kaj antaŭ kaj post la batalo oni manumas por esprimi respekton kaj egalecon. En la jaro 1914 Glima estis olimpia konkurso. Per la teatraĵo pri la ŝtelo de la martelo de Toro ni estis rave kaj rapide enkondukitaj en la mitologion de la nordiaj dioj.

Ja impresite de la islanda naturo, mi per du tuttagaj dumkongresaj ekskursoj kaptis la okazon ĝui pli. La ora cirklo kun tri el la plej elstaraj turismaj allogaĵoj estas nepraĵo por ĉiu unufoja vizitanto de la insulo. La impona duŝtupa akvofalo de Gullfoss (orakvofalo) preskaŭ estus malaperinta. Jam vendita al angla entrepreno, kiu planis tie reteni la riveron Hvita por produkti elektran energion, ĝi pro la insistado de najbara kamparanino revenis al la ŝtato kaj nun estas protektita naturejo. La Granda Gejsero, kiu donis sian nomon al ĉiuj aliaj gejseroj tra la mondo, intertempe ne plu regule aktivis. Sed la najbara Strokkur



Gullfoss

(buterbarelo) minimume ĉiujn 10 minutojn mirigas la ĉirkaŭe atendantajn turistojn per forta bolado, poste leviĝo kaj fine ŝprucego en ĉ. 30 metrojn alta akvokolono. Natura heredaĵo de UNESKO estas la nacia parko de Pingvellir. Tie oni povas promeni en kanjono formita de la fordivido de la Eŭropa kaj Amerika tektonplatoj. La plej malnova ankoraŭ ekzistanta parlamento de la mondo estas la Athing, kiu tuj apud ekstere asembleis inter 930 kaj 1798.

Dum la dua ekskurso mi ĝuis la akompanion de klubano Hans Gerd. En la ekloĝiĝa centro de Borganes ni kune lernis pri la vikingaj batalantoj el "La Sagao de Egil", unu el la plej gravaj islandaj sagaoj. Post la vizito al Reykholt, kulturcentro memorige al la signifa mezepoka poeto kaj historiisto Snorri Sturluson en sia iama hejmloko, la vojaĝo gvidis nin al la idiliaj vastaj akvofaloj de Hraunfossar (lafoakvofalo) kaj la pro laŭlegenda morto de infanoj tragediaj Barnafossar (infanojakvofalo). Lasthalta Deildartunguhver, unuiĝo de multaj akvoriĉaj bolantaj fontoj provizas ĝis 60 kilometrojn forajn urbetojn per varmega akvo.



Ĉe Mývatn

Mia vizito al Islando estis neforgesebla pro la naturbelecoj, la interesaj homoj, la spertita amikeco, la bona vetero, la nekonataj manĝaĵoj, ... Libervole reveni? Jes, certe. – Alke